

La instrumentodologio proponita de Kultura Centro Esperantista
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-815/276, 1979 majo 24, 26
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-40/SRI-1979-40-A-3-276-815-1979-05-24-26-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-instrumentodologio-proponita-de-Kultura-Centro-Esperantista.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Kolokvo grupiginta edukistojn en Berno la 31-an de marto ekzamenis raportojn koncerne la esperanto-instruadon lernejan. Inter tiuj ĉi dokumentoj troviĝis instruplano de esperanto por la duagrada lernejo. Ĝi antaŭvidas, ke la disponebla instrutempo dividiĝu en kvar samgravaj instru-vojoj. Unue la gesta instruado celas la parolan praktikon. Due la aŭdvida instruado fortikigas kaj klarigas la lingvajn malkovrojn de la gelernantoj kaj ligas la gestan instruadon al la instruado gramatika kaj stila. Tiu ĉi gramatika kaj stila ekzercado efektiviĝas helpe de programitaj ekzercoj, kiuj permesas individuigitan instruadon. Fine la kolektiva instruado utiligas la lingvon profite al la plivastigo de la kulturaj kaj civitanaj konoj de la gelernantoj.

A.- Ni provos hodiaŭ doni al vi kelkajn precizigojn koncerne tiun ĉi instrumentodologion de esperanto.

Cl.- La programitaj kursoj kaj ekzercoj, kiujn Kultura Centro Esperantista iom post iom publikigas ebligas absolute individuigitan instruadon. Tio signifas, ke ĉiu lernanto antaŭeniras laŭ propra rapido al la malkovro de la gramatikaj kaj stilaj proprecoj de esperanto.

A.- Testoj permesas regule mezuri ĉies progresojn kaj mankojn. Ili situigas la lernantojn ne rilate al la aliaj gelernantoj, sed al la lernoplano.

Cl.- Tiu ĉi individuigo estas favora al ĉiuj. La plej lertaj gelernantoj rapidege antaŭeniras. Baldaŭ ili povas sin dediĉi al propraj aktivecoj. Ili mem elektas sian orientadon. Sin proponas tradukekzercoj, legaĵoj, korespondado, interŝanĝoj, preparo de prelegeto aŭ de raporto, ktp. En tiu ĉi fazo de la esperanto-lernado gramatiko ĉesas esti celo en si mem, ĝi fariĝas rimedo al klara interkompreno. Dum tiu ĉi instrutempo dediĉita al la individua alproprigo de la lingvo, la malplej lertaj gelernantoj havas la rajton antaŭeniri etpaŝe. En grupaj aktivecoj ili ricevas la konsilojn de la plej lertaj.

A.- La kolektiva instruado estas liberigita de la gramatikaj klarigoj, kiuj apartenas al la programita instruado. Ĝi ankaŭ estas liberigita de la specife lingvaj ekzercoj, pri kiuj zorgas la gesta kaj la aŭdvida instruadoj. Tiel la kolektiva instruado povas vere akcenti la praktikon de esperanto.

Cl.- Komence, dum la vortprovizo de la gelernantoj restas limigita, la instruisto legigas kaj studigas mallongajn tekstojn beletrajn. Plurajn el ili la gelernantoj poste memorigos.

A.- Poste la instruisto ekdonos lecionetojn pri plej diversaj fakoj. Ilia ĉefa celo ĉiam restas la vortara riĉiĝo.

Cl.- Fine, en tiuj momentoj de kolektiva aktiveco, la instruisto enkondukos temojn, kiuj vekos diskutojn kaj kondukos al precizaj serĉadoj. La celo fariĝas la plivastiĝo de la konoj de la

gelernantoj. Ekde nun esperanto ĉesas esti celo en si mem. Ĝi iĝas kultura rimedo permesanta rilati kun alikantonuloj aŭ eĉ alinaciuloj.

A.- La preparo de renkontiĝo ekdonas al la kolektiva instruado dinamismon profitigan ne nur al la lernado de esperanto, sed ankaŭ al la ĝenerala lerneja aktiveco.

Cl.- Ĉiu lernanto posedu la studoplanon de esperanto. Temas fakte pri la listo de la asimilotaj vortoj kaj gramatikaĵoj. Tiun bazan vortaron ellaboris dum ses jaroj instruistoj esperantlingvaj. Ĝi ne nur baziĝas sur la jam ekzistantaj fundamentaj vortaroj, sed ankaŭ sur la radik-ofteco en beletraj tekstoj studotaj. Minigramatiko donas la liston de la finaĵoj kaj afiksoj, kiuj karakterizas esperanton.

A.- Tre regule testoj devas permesi al la gelernantoj ricevi ideon pri ilia asimil-nivelo de la baza vortaro. Tiuj ĉi testoj indikas al ĉiuj, kiujn programitajn ekzercojn ili devas ankoraŭ fari.

Cl.- Kiam alvenas la momento elekti propran aktivecon, ankaŭ rilate al tiu ĉi aktiveco preciza studoplano devos esti fiksita. Refoje regulaj testoj aŭ demandoj indikos al la koncernatoj la proprajn progresojn.

A.- La studo de esperanto devas kiel eble plej rapide konduki al aŭtonomeco en la lingvopraktikado. Tial la gelernantoj tuj eklernos utiligi la oficialajn vortarojn, inter ili ĉefe la Plenan Vortaron de Esperanto. Ili kutimiĝos konsulti gvidilojn gramatikajn kaj stilajn, kiel la Fundamenton de Esperanto kaj la Lingvajn Respondojn.

Cl.- La lingvan normon ne trudu la instruisto, sed la konsulteblaj dokumentoj.

A.- Por la aŭdvida instruado la instruisto utiligas instrumaterialon. Inter la plej taŭgaj instruiloj troviĝas tabeloj por la flanelilo, kiuj alportas kvazaŭ radiografian komprenon pri la lingvomekanismoj. La migrado de la vortelementoj en la tabelajn fakojn konkretigas la gramatikajn kaj vortfaradajn regulojn.

Cl.- La esperanta aŭdvida instruado, kontraŭe al tio, kio okazas por la lingvoj franca, germana, angla aŭ rusa, evitas la ripetadon parkereman. Esperanto ne estas flekcia lingvo kie oni devas parkeri formulojn, kiujn trudi la uzo. Esperanto, simile al la ĉina, estas aglutina kaj izoliva lingvo, kie oni konstruas vortojn kaj propoziciojn helpe de nevariaj elementoj, kiuj kombiniĝas senlime laŭ kelkaj reguloj precizaj kaj senesceptaj. La aŭdvida instruado devas konsciigi pri tiuj vortfaradaj reguloj. Helpe de limigita nombro da elementoj ĝi proponas al la gelernantoj konstrui la plej grandan nombron de eblaj vortoj kaj frazoj.

A.- En esperanto la vortkreado ludas ĉefrolon, dum en la okcidentaj lingvoj kiel la franca, germana, angla aŭ rusa la parkerema ripetado estas la ĉefa elemento de la aŭdvida instruado. En esperanto la asimilado de la vortfaradaj mekanismoj malŝarĝas la memoron profite al koncentriĝo super tre preciza baza vortaro. La aŭdvida kaj la gesta instruadoj montras al la gelernantoj, kiel konstrui pli kaj pli riĉan kaj pli kaj pli precizan vortaron helpe de bazaj elementoj.

Cl.- Ĉisomere, tuj post la Universala Kongreso, okazos en la kadro de Internacia FERIA Altlernejo en La Chaux-de-Emonds pedagogia seminario pri la aŭdvida kaj gesta instruado de

esperanto. Interesatoj petu la koncernan informilon pri tiu ĉi kurso kaj pri la aliaj kursoj de IFA tra la kanalo de Svisa Radio Internacia.

A.- Vi aŭdis elsendon pri la instrumetodologio por esperanto proponata de Kultura Centro Esperantista. Parolis nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013*